

# LA SUNO HISPANA

## Kongreso

Sub la presido de D-ro Zamenhof. Malfermo en Boulogne-sur-mer, la 5<sup>an</sup> de proksima Aŭgusto posttagmeze.

La 6<sup>an</sup>, 7<sup>an</sup>, 8<sup>an</sup> kaj 9<sup>an</sup> kunvenoj en kiuj oni diskutados kaj voĉdonos gravajn aferojn pri Esperanto.

La 10<sup>an</sup> okazos mara promenado dum kiu oni vizitos esperantistajn havenojn, anglajn kaj francajn.

La sekvantaj tagoj vizito de najbaraj grupoj, koncertoj, festenoj, baloj, k. t. p.

La Kongresa kunveno estos ĉe la urba granda teatro en kiu estos plie ekspozicio esperanta.

La organiza Komitato sciigas ke:

Geesperantistoj kiuj deziras mendi ĉambrojn nur per kelkaj tagoj skribu—kiun tagon ili alvenos—la daŭron de la ĉeesto—la prezon maksimuman ke ili pagus—la apartajn dezirojn pri vivado, nombroj de ĉambroj, k. t. p.

Ĉiu ironta kiu povas kanti aŭ deklami, bonvolu sciigi al ĝi detalojn pri tio.

Ĉiu grupo kiu bonvolas organizi en sia urbo la afiŝado de reklamoj en la plej vizitataj lokoj skribu kiel eble plej baldaŭ por ricevi la taŭgan tekston.

Ĉiuj esperantistoj kiuj sendis 3 francojn kiel simpla aliĝo, ricevos dum Junio siajn kartojn. La aliaj, kiuj pagis almenaŭ 5 francojn, ricevos kune kun la karto, detalajn programojn kaj ilustritan gvid-

## Congreso

Bajo la presidencia del Dr. Zamenhof. Apertura en Boulogne-sur-mer el 5 de Agosto próximo por la tarde.

El 6, 7, 8 y 9, reuniones en las cuales se discutirán y votarán importantes asuntos referentes al Esperanto.

El 10 tendrá lugar un paseo por mar, durante el cual se visitarán puertos esperantistas ingleses y franceses.

Los días siguientes, visita de grupos vecinos, conciertos, banquetes, bailes, etcétera.

El lugar de sesiones del Congreso será en el gran teatro de la ciudad, en el cual habrá además una exposición esperanta.

El Comité organizador hace saber que:

Los esperantistas de ambos sexos que deseen encargar habitaciones, sólo para algunos días, escriban—qué día irán—la duración de la permanencia—el precio máximo que pagarían—sus otros deseos, respecto á modo de vivir, número de habitaciones, etc.

El que haya de ir que pueda cantar ó declamar, haga el favor de dar detalles respecto á ello.

Cada grupo que quiera organizar en su ciudad la publicación por carteles fijados en los lugares más públicos, que escriba lo más pronto posible y recibirá el oportuno texto.

Todos los esperantistas que envíen 3 francos como simple adhesión, recibirán durante Junio sus tarjetas. Los otros que paguen lo menos 5 francos, recibirán juntamente con la tarjeta, programas de-



libron de Boulogne kaj de la Kongreso.

La Kongreso libro konsistas el—historio de la Kongreso—detalaj programoj—gvidlibro por la vizito de Boulogne—planoj kaj ilustraĵoj—frazlibro esperanta franca por turistoj—komercaj esperantaj reklamoj.

Por la granda Ekspozicio organizita, ĉiuj grupoj esperantistaj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn al S-ro Deligny, sekretario de la grupo de Saint-Omer (France).

La pagontaj almenaŭ 5 frankojn, ricevos ankaŭ rabaton da 50 po 100 sur la francaj fervojoj.

Por ĉiuj sciigoj sin turni al S-ro Michaux, advokato—Boulogne-sur-mer—Francujo.

tallados y una guía ilustrada de Boulogne y del Congreso.

El libro del Congreso consiste en—historia del Congreso—programas detallados—guía para visitar Boulogne—planos é ilustraciones—fraseología esperanto francés para turistas—anuncios comerciales en Esperanto.

Para la gran Exposición que se organizará se pide á todos los grupos que envíen el mayor número posible de documentos al Sr. Deligny, secretario del Grupo de Saint-Omer (Francia).

Los que paguen al menos 5 francos recibirán también rebaja de 50 por 100 en las líneas férreas francesas.

Para todas las noticias diríjanse al Sr. Michaux, abogado, Boulogne-sur-mer, Francia.

## Bibliografio

*La tekniko de la termala kuracado ĉe Aix-les-Bains. Verkis D-ro Jean Dardel.* Eldonita de A. Maloine, 25, rue de l'Ecole de Médecine. Paris.

Tiu ĉi broŝuro apartenas al la «Esperanta Medicina Biblioteko» kaj prezentas klaran kaj plenan priskribon en Esperanto pri la kuracado kaj rezultatoj de la Aix'aj termalakvoj. Bonegaj engravuraĵoj ornamas kaj plej bone komprenigas la tekston, kiu sufiĉege enhavas, kiel oni povas ja antaŭsupozi, teknikajn terminojn kaj kunhelpas al elfaro de la internacia anatomia Vortaro, kiun intencas publikigi la Medicina Grupo esperantista. Por ĉiuspecaj informoj sin turnu al ĝia ĝenerala sekretario, D-ro Paul Rodet, 93, boulevard Saint-Germain, Paris.

*La komerca sekretario, dokumentaro komerca verkita de Johano Ros Sudriá.* Librejo Hachette kaj K.<sup>o</sup> Parizo. Prezo: 0 fr. 50.

Kiel montras ĝia titolo, tiu ĉi verko enhavas kolekton da diversaj komercaj dokumentoj redaktitaj nur en Esperanto:

## Bibliografía

*La tekniko de la termala huracado ĉe Aix-les-Bains. Verkis D-ro Jean Dardel.* Editado por A. Maloine, 25, rue de l'Ecole de Médecine. Paris.

Este folleto pertenece á la «Biblioteca Esperantista de Medicina» y presenta una descripción clara y completa en Esperanto del tratamiento y resultado de las aguas termales de Aix-les-Bains. Grabados excelentes adornan y permiten la mejor comprensión del texto, que abunda, como puede muy bien suponerse, en términos técnicos y contribuirá á la confección del Diccionario anatómico de la lengua internacional, que intenta publicar el Grupo esperantista de Medicina. Para toda clase de informes dirigirse á su secretario general, Dr. Paul Rodet, 93, boulevard Saint-Germain, Paris.

*La komerca sekretario, dokumentaro komerca verkita de Johano Ros Sudriá.* Librería Hachette y C.<sup>a</sup>, Paris. Precio: 0'50 fr.

Como indica su título, esta obra contiene una colección de variados documentos comerciales redactados solamente



modeloj de leteroj por ĉiuspecaj sciigoj kaj komisioj, bilancoj, ĝiroj, fakturoj, kvitancoj, k. t. p. La stilo estas klara kaj bonega, kaj ni ne dubas, ke la «Komerca Sekretario» estos multutila por ĉiuj personoj dezirantaj uzadi Esperanto en siaj negocoj kun alilanduloj. La aŭtoro promesas pliampleksigi sian verkon kaj aldoni komercan vortareton, kiam publikigos la dua eldono, ĉar nune tion ĉi al li malpermesis neatenditaj okupaĵoj. Ni de ziras al li plej bonan sukceson kaj vidi baldaŭ efektivigita lian promeson.

*Vortaro esperanta-hispana kaj hispana-esperanta* de V. Inglada Ors kaj A. Lopez Villanueva. Librejo J. Espasa, Cortes, 579. Barcelona. Prezo: 6 pesetoj.

Ĝus publikigis la «Vortaroj» antaŭ longe promesitaj kaj senpacience atenditaj de la hispanaj esperantistoj: ili estas komplemento de «Lernolibro kaj ekzercoj» de la samaj aŭtoroj kaj metas en manojn de la hispanoj ĉiujn necesajn elementojn por la plena kaj rapida ellernado de Esperanto. La «Vortaro esperanta-hispana» enhavas ĉiujn radikojn de la lingvo internacia ĝis nun aprobitaj de D-ro Zamenhof kaj la «Vortaro hispana-esperanta», estas sufiĉe vastampleksa (20.000 vortoj ĉirkaŭe). Ni kredas, ke tiu ĉi verko akcelos la progresojn, kiujn nune Esperanto efektivigas en nia patrujo kaj ke baldaŭ Hispanujo postsekvos la elravigan ekzemplo de aliaj nacioj kiel Francujo, Anglujo, k. c., kiuj estas plene almititaj por nia afero.

*La Kolorigisto-aerveturanto* de doktoro V. Godineau, tradukita de la Grupo esperantista de Monako. Librejo Hachette kaj K.<sup>o</sup> Parizo. Prezo: 0 fr. 30.

La Monaka Grupo esperantista lerte tradukis esperanten bela priskribon pri aerveturo farita en 1886 de D-ro Godineau kun du aliaj kunvojaĝantoj. La rakonto estas mallonga sed interesa kaj la esperantistoj legos kun granda plezuro «La Kolorigisto-aerveturanto», kiu tre

te en Esperanto: modelos de cartas para toda clase de conocimientos y comisiones, balances, giros, facturas, recibos, etcétera. El estilo es excelente y claro y no dudamos que el «Secretario comercial» será de utilidad suma para todas las personas que deseen usar el Esperanto en sus negocios con el extranjero. El autor promete ampliar su obra y añadir un vocabulario comercial cuando publique la segunda edición, en atención á habersele impedido actualmente ocupaciones inesperadas. Le deseamos el mejor éxito y ver pronto cumplida su promesa.

*Vocabulario esperanto-español y español-esperanto*, por V. Inglada Ors y A. López Villanueva. Librería J. Espasa Cortes, 579. Barcelona. Precio: 6 pesetas.

Acaban de publicarse los «Vocabularios» prometidos hace tiempo y que han aguardado impacientemente los esperantistas españoles: forman el complemento del «Manual y ejercicios» de los mismos autores y ponen en manos de los españoles todos los elementos necesarios para el estudio rápido y completo del Esperanto. El «Vocabulario esperanto-español» contiene todas las raíces de la lengua internacional hasta ahora aprobadas por el Dr. Zamenhof, y el «Vocabulario español-esperanto» es bastante extenso (20.000 palabras poco más ó menos). Creemos que esta obra acelerará los progresos que realiza actualmente el Esperanto en nuestra patria y que en breve España seguirá el ejemplo deslumbrador de otras naciones como Francia, Inglaterra, etc., que están plenamente conquistadas para nuestra causa.

*La Kolorigisto aerveturanto* del doctoro V. Godineau, traducido por el Grupo esperantista de Monaco. Librería Hachette y C.<sup>a</sup> París: 0'30 fr.

El Grupo esperantista de Mónaco ha traducido al Esperanto una hermosa descripción de una excursión aérea realizada en 1886 por el Dr. V. Godineau en unión de otros dos viajeros. El relato es corto pero muy interesante, y los esperantistas leerán con gran placer el «Kolorigisto



baldaŭ ĝuos la ŝatatecon de la publiko.

*English Esperanto Key*, propaganda broŝureto. Prezo: 0 fr. 04 po unu, 0 fr. 40 po dek, kaj 3 fr. po cent ĉe S-ro Ĉefeĉ, 304, Brixton Hill, London S. W. Ni laŭdas la ideon kaj rekomendas la verkon.

*La langue internationale auxiliaire* eltiro el raporto pri la ĝeneralaj kunsidoj de la «Association française pour l'avancement des sciences (Kongreso de Grenoble de 1904<sup>a</sup>) okazintaj por la diskutado de la nomita afero. Ĉe la sekretario de la esperantista Grupo Pariza (28, rue Serpent). Prezo: 0'50 frankoj.

La titolo de tiu broŝureto klare montras la grandan intereson, kiun ĝi devas prezenti al ĉiujn esperantistoj, kaj se oni atentigas, ke en la nomita diskutado partoprenis la eminenta profesoro, S-ro Carlo Bourlet, por fari tre brilajn defendojn pri Esperanto, kontraŭ la opinio de sinjoro Leon Bollack, partiano kaj aŭtoro de «Blua Lingvo», oni facile komprenas, kial ni sincere rekomendas al ĉiuj, kiuj konas la francan lingvon, la akiron de tiel belega verketo.

*Rapport sur les progres de l'idee de la langue internationale* prezentita de S-ro Louis Conturat en la 2<sup>a</sup> Kongreso internacia de filozofio (Genevo, 4-8 Septembro 1904). Eltirajo el la kunsidraporto de la Kongreso.

La laŭdon, kiun al ni meritis la antaŭe montrita verketo, oni juste devas aljuĝi al la «Raporto» de S-ro Conturat, kies elokventeco sukcesis unuanime aliĝi la Kongreson al «Delegacio por alpreni de helpa lingvo internacia». La senlaciĝan francan propagandanton ni gratulas kaj deziras al li plej brilajn sukcesojn por a penlaborado pri «Delegacio», kiun li faras kun tiel nobla entuziasmo kiel ĉiekonita talento.

aerverturanto», que gozará muy pronto del favor del público.

*English Esperanto Key* Folletito propagandista. Precio: 0'04 fr. uno, 0'40 diez, y 3 fr. el ciento en casa del Sr. Ĉefeĉ, 304, Brixton Hill London S. O. Alabamos la idea y recomendamos la obra.

*La langue internationale auxiliaire*, extracto de las sesiones generales celebradas por la «Asociation française pour l'avancement des sciences» (Congreso de Grenoble de 1904) para la discusión de dicho asunto. De venta en la secretaría del Grupo esperantista de París (28, rue Serpente). Precio: 0'50 fr.

El título de dicho folleto muestra claramente el gran interés que debe ofrecer á todos los esperantistas, y si se tiene en cuenta que en la mencionada discusión ha intervenido el eminente profesor señor Carlo Bourlet para hacer una brillantísima defensa del Esperanto, contra la opinión del Sr. León Bollach, partidario y autor de la «Lengua Azul», se comprenderá fácilmente por qué recomendamos sinceramente á todos los que conocen la lengua francesa la adquisición de tan preciosa obrita.

*Rapport sur le progres de l'idee de la langue internationale*, presentado por M. Louis Conturat en el 2.<sup>o</sup> Congreso internacional de filosofía (Ginebra, 4-8 Septiembre 1904). Extracto de las sesiones del Congreso.

El elogio que nos ha merecido la obrita anterior, debe darse con justicia á la «Memoria» del Sr. Conturat, cuya elocuencia ha conseguido la adhesión unánime del Congreso á la «Delegación para la adopción de una lengua internacional auxiliar». Felicitamos al incansable propagandista francés y le deseamos el éxito más brillante en los trabajos de la «Delegación» que lleva á cabo con tan noble entusiasmo como reconocido talento.



## Sciigoj

Mortis sinjorinoj patrino kaj edzino de niaj karaj amikoj kaj samideanoj pastro Guinart kaj leŭtenanto Ariza.

Al tiuj ĉi sinjoroj kaj al la ambaŭaj familioj, ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.

**Alĝerujo.**—Per bona revueto «La Algeria Stelo», ni plezure scias pri la sukceso de esperanta Ekspozicio en Alĝero. Niajn gratulaĵojn al la fervoregaj esperantistoj de la Nord Afrika grupo.

**Amerika Uningitaj Ŝtatoj.**—Oni kreis grupon en Boston.

**Anglujo.**—Novajn grupojn oni fondis en *Canonbery, Rabata* (Malta) kaj *Chippenham*

Nia kara kolego «The British Esperantist» pligrandigis de 12 ĝis 16 paĝoj kaj daŭrigas sukcese ĝian propagandon. Gratulaĵojn!

En la kolonoj de tiu gazeto, esperantisto 7.778 esprimas ke estos tre interese scii la plej amatajn okupojn kaj interesaĵojn de liaj fratinoj en la eksterlando kaj li invitas ke ili poŝtkarte sendu ian opinion pri «Kiaj temoj plej plaĉas al la tutmonda virinaro?» Sin turnu, 13, Arundel-Street, Londono.

Ĝia Maja numero rilatas pri klopodoj de grupoj *Folkestone, Glasgow, Warrington, Barrow-in-Turnes, Acton* kaj *Dover* por progresigi nian karan lingvon.

**Belgujo.**—Ni ricevis kaj plezure enpresas la jenan leteron:

Estimata redaktoro: Mi kuraĝas uzi la gastamon de via estimata gazeto por sciigi la legantojn pri la sekvanta. En la lastaj tagoj de Aprilo malfermiĝos en Lieĝo tutmonda internacia ekspozicio kiu estos sufiĉe riĉa kaj rimarkinda. Ĝi estos fermita en Novembro. Certe dum tiuj

## Noticias

Han fallecido las señoras madre y esposa de nuestros queridos amigos y colegas, los Sres. Padre Guinart y teniente Ariza.

A estos señores y á las familias de ambos, damos nuestro más sentido pésame.

**Argelia.**—Por la buena revistita «La Algeria Stelo» hemos tenido el gusto de saber el éxito de la Exposición esperantista en Argel. Nuestras felicitaciones á los fervorosísimos esperantistas del grupo del Africa del Norte.

**Estados Unidos de América.**—Se ha creado un grupo en Boston.

**Inglaterra.**—Se han fundado nuevos grupos en *Canonbery, Rabata* (Malta) y *Chippenham*.

Nuestro querido colega «The British Esperantist» ha aumentado sus páginas de 12 á 16, y continúa con éxito su propaganda. Felicitaciones!

En sus columnas, el esperantista 7.778 expresa que será muy interesante saber las preferidas ocupaciones y cosas que interesen á sus hermanas del extranjero, y las invita á que por tarjeta postal le envíen alguna opinión respecto á qué temas son más agradables á la mujer de todo el mundo. Dirjanse, 13, Arundel-street, Londres.

En su número de Mayo se refiere á trabajos de los grupos de *Folkestone, Glasgow, Warrington, Barrow-in-Turnes, Acton* y *Dover* para el progreso de nuestra querida lengua.

**Bélgica.**—Hemos recibido y tenemos el gusto de insertar la siguiente carta:

Estimado redactor: Me atrevo á usar el hospedaje de su estimada revista para hacer saber á los lectores lo siguiente: En los últimos días de Abril se abrió en Lieja una exposición universal que será suficientemente rica y notable. Se cerrará en Noviembre. De seguro durante esos



ses monatoj multaj samideanoj de ĉiuj landoj vizitos nian urbon; kaj dezirante esti utila al ili iamaniere, nia Grupo akceptos kun granda plezuro la alilandajn samideanoj en siaj kunvenoj. Tiuj okazadas dufoje ĉiusemajne, lunde kaj vendrede, je la 8<sup>a</sup> horo vespere, en la kafejo «Au Petit Trianon», boulevard de la Suveniére, apud la Reĝa Teatro. Amika interkonigo estos agrabla kaj utila. Bonveno al ĉiuj! Kun kore saluto, *G. Sloutzky*, rue des Prébendiers, 48—Liege (Belgique).

**Bulgarujo.**—Ni bedaŭre sciis ke malaperis nia bonega kolego «Rondiranto» kvankam provizore. Ni deziregas ĝian baldaŭan revenon al la batalado.

**Francujo.**—Havre-a grupo decidis kelkajn kunvenojn speciale dediĉitajn al deklamoj, kantoj kaj aliaj teatraĵoj en Esperanto.

La urbeŝtaro de *Sens* subvencionis per du-dek-kvin frankoj la tiean grupon. Nian vermegan saluton.

Oni fondis grupojn en *Valence*, *Versailles*, *Roanne*, *Cette*, *Rennes*, *Beziers*, *Brest* kaj *Arras*.

La bona ĵurnalo «La France du Nord» kiu eliras en Boulogne-sur-mer sciigas nin ke dum la lasta Paska libertempo, la bulonjaj esperantistoj organizis vesperkunvenojn en *Folkestone*, *Calais* kaj *Samer*. Oni faris paroladojn kaj ludis muzikon, kaj interkomprenis bonege francaj kaj anglaj. Ĝi citas kiel ĉefparintoj de tiuj ĉi festoj al S-inoj Bergier kaj Parsons, fraŭlinoj Bergier kaj Michaux, kaj S-roj Michaux kaj Guyot.

Ankaŭ esprimas ke tiea militestro sinjoro kolonelo Mayran organizis esperantan kurson farotan de nia kara sinjoro Michaud.

Laŭ ni vidas en «La revue de l'Esperanto» fako de la grava ĵurnalo «Le Cicerone», la organizanta komitato de nia aŭgusta Kongreso, ricevadas de ĉie, monferojn, aliĝojn kaj promesojn pri ĉeesto. El ĝi ni ankaŭ eliras ke estas

seis meses, muchos colegas de todos los países visitarán nuestra ciudad, y deseando nuestro grupo serles útil de alguna manera, los aceptará con mucho gusto en sus reuniones. Estas tienen lugar dos veces por semana, los lunes y los viernes á las seis de la tarde en el café «Au Petit Trianon», boulevard de la Suveniére, cerca del Teatro Real. Un amistoso conocimiento mutuo será agradable y útil. Bienvenida á todos! Con un cariñoso saludo, *G. Sloutzky*, rue des Prébendiers, 48—Lieja (Bélgica).

**Bulgaria.**—Hemos sabido con sentimiento que ha desaparecido nuestro magnífico colega «Rondiranto», aun cuando provisionalmente. Muchísimo deseamos su pronto regreso á campaña.

**Francia.**—El grupo de Havre ha dispuesto algunas reuniones especialmente dedicadas á declamaciones, cantos y otros actos teatrales en Esperanto.

El municipio de *Sens* ha subvencionado á aquel grupo con 25 francos. Nuestro caluroso saludo.

Se han fundado grupos en *Valence*, *Versalles*, *Roanne*, *Cette*, *Rennes*, *Beziers*, *Brest* y *Arras*.

El buen periódico «La France du Nord», que se publica en Boulogne-sur-mer, nos hace saber que durante las vacaciones de la última Pascua, los esperantista bulogneses organizaron reuniones vespertinas en *Folkestone*, *Calais* y *Samer*. Se hicieron discursos y música y se comprendieron entre sí perfectamente franceses é ingleses. Cita como principales actores de estas fiestas á las señoras Bergier y Parsons, señoritas Bergier y Michaux y Sres. Michaux y Gulot.

También expresa que el señor coronel Mayran, jefe militar de allí, ha organizado un curso esperanto que será dado por nuestro querido Sr. Michaud.

Según vemos en «La revue de l'Esperanto», sección del importante periódico «Le Cicerone», el comité organizador de nuestro Congreso de Agosto recibe de todas partes donativos en metálico, adhesiones y promesas de asistencia.



preta kaj baldaŭ aperos 5.000 ekzemplerojn de «Kongresa Libro» de kiuj la komitato sendos ekzempleron al ĉiuj esperantistaj societoj kaj al ĉiu aliĝanto kiu estos paginta almenaŭ 5 frankojn. Nun, oni kolektas komercajn reklamojn enmetojn. La prezoj de ĉia reklamo estas 20 frankoj po paĝo kaj 10 fr. po duonoda paĝo. Formato—17×12 centimetrojn. 172 grupoj jam sendis aliĝon. Kelkaj el ili sendis pli ol 20 delegatojn. Tiel oni povos certigi ke la universala Kongreso havos grandan sukceson. Ĉiu vera esperantisto, spite malfacilaĵoj devos nepre ĉeesti por helpi la definitivan venkon.

**Germanujo.**—Oni fondis grupojn en *Goppingen Wurtemberg, Planem kaj Breslau.*

**Rusujo.**—Per la esperanta gazetaro ni scias la apero de rusa kolego. Ni deziras al ĝi la plej plenan sukceson.

Societo «Espero» komencis la eldonon de oficiala organo titolita «Ruslanda Esperantisto», kiu disdonas senpage ĉe siaj membroj. La Aprila n.<sup>o</sup> 1 konsistas je belega kaj interesa kvindek sespaĝa kajero enhavanta gravegajn sciigojn pri Esperanto. Ĝia direktoro estas la konata D-ro S-ro A. I. Asnes kiun ni varmege salutas kiel ankaŭ la ŝatindan kolegon kies plej altan sukceson ni deziras. La kotizajo de la grupoj de societo «Espero» estas du rubloj ĉiujare kaj la kosto de unu numero al la neanoj, tridek kopekoj. Adreso: S. Petersburgo, Bolŝ, Podjaĉeskaja, 24, Rusujo.

**Svisujo.**—Nia estimata kolego «Juna Esperantisto» faris en sia februara numero plenan kaj kontentigan raporton pri la progresoj kiujn faris Esperanto en la mondo dum la lasta pasinta jaro.

Ĝia inda samlandano «Svisa Espero» rilatas pri nunaj laboroj pro Esperanto en *Neuchatel, Lucerno kaj Genevo.*

Tambiĝn de ĉl extractamos que estān dispuestos y pronto aparecerān 5.000 ejemplares del «Libro del Congreso», del cual el comitē enviarā ejemplar ā todas las sociedades esperantistas y ā todo adherido que haya pagado al menos 5 francos. Ahora recoge anuncios para insertar. Los precios de cada anuncio son 20 francos por pāgina y 10 francos por media pāgina. Tamaño—17×12 centímetros. 172 grupos se han adheridos ya. Algunos de ellos envīan mās de veinte delegados. Asī se podrā asegurar que el Congreso universal tendrā gran ěxito. Todo verdadero esperantista, ā despecho de dificultades, debe irremisiblemente asistir ā ĉl para ayudar al triunfo definitivo.

**Alemania.**—Se han fundado grupos en *Goppingen Wurtemberg, Planem y Breslau.*

**Rusia.**—Sabemos por la prensa esperantista la apariciōn de un colega ruso. Le deseamos el mās completo ěxito.

La Sociedad «Espero» ha empezado la ediciōn de un ōrgano oficial periōdico con el tītulo «Ruslanda Esperantisto», que se distribuye gratis entre sus miembros. El n.<sup>o</sup> 1 de Abril consiste en un hermoso ē interesante cuaderno de cincuenta y seis pāginas conteniendo importantīsimas noticias del Esperanto. Su director es el conocido Dr. Sr. A. I. Asnes, al cual calurosamente felicitamos, como tambiĝn al agradable colega, ā quien deseamos el mayor ěxito. La cotizaciōn de los miembros de la sociedad «Espero» es de dos rublos anualmente, y el precio de un nūmero, ā los no socios, 30 copecs. Direcciōn: San Petersburgo, Bolŝ, Podjaĉeskaja, 24, Rusia.

**Suiza.**—Nuestro estimado colega «Juna Esperantisto» hizo en su nūmero de Febrero una completa y satisfactoria relaciōn de los progresos que ha hecho el Esperanto en el mundo durante el aņo prōximo pasado.

Su digno paisano «Svisa Espero» menciona actuales trabajos en pro del Esperanto en *Neuchatel, Lucerna y Ginebra.*



**Hispanujo.**—Nia samideano la Staba leŭtenanto kolonelo S-ro Romano Ayza publikigis broŝuron titolitan «Teorio de la Aritmetikaj, komplementoj kaj supra-restoj» kiu estas tre bonakceptita ĉe la matematikuloj pro ĝia originaleco kaj klareco en la prezentado. Ni gratulas nian amikon tiel amanto de armoj, kiel de sciencoj, kaj de nia kara lingvo.

Grupo esperantista de *Murcia* ricevis la 10<sup>an</sup> de Majo belan kaj interesan leteron elirintan el grupo Praha kiu jam vizitis Berlinon, Stockolmon, Petersburgo, Plovdiv'on (Bulgarujo), Romon kaj Algeron, ricevante pacajn kaj amikajn esprimojn, kun ĉiuspecaj kuriozaĵoj kaj propagandante nian aferon, ĉar dum la esperantistoj rigardadas ĝin ame, la aliaj surprize admiras Esperanton kaj estas allogataj al ĝi. La 15<sup>an</sup>, la letero foriris al Parizo, kaj poste ĝi devas viziti Londonon, Montrealon, Meksikon, Lima'on, Santiagon de Ĉilio, Melburnon, Manilon, Bombay (Hindujo), Yokoamon kaj reveni en Prahon. Ni varme deziras ke ĝi finu sian rondiron, unuigante la korojn!

La *Murcia* grupo aliĝis al la festoj tie efektivitaj por rememori la trian centjaron de la publikiĝo de la senmorta verko de nia glora Cervantes, kaj niaj legantoj rememoros ke oni anoncis premion por la plej bona traduko esperanta de kia ajn ĉapitro *Kihota*, de tiu mirinda libro kiu dum tri centoj da jaroj ridigis la popolasojn kaj pripensigis la klerulojn. Tri premiojn estis aljuĝintaj al tri bonaj tradukoj, unu de S-ro Ĉarlo Bourlet, la grava scienculo, lertega esperantisto kaj nelacebla propagandanto de nia kara lingvo en Francujo, alia de nia neniam sufiĉe laŭdata kolaboradoro kapitano S-ro Vicente Inglada, kaj alia de la fervora anglo S-ro Geo. C. Law. Ĉiu kompreneble tradukis de sia patra lingvo. Oni jesigas al ni ke la provo elmontris ke nur Esperanto estas fidela spegulo por plene konigi literaturan verkon, kiam ni ne elscias la lingvon en kiu ĝi estas verkita, kaj ke baldaŭ ni povos tion vidi, kiam estos presitaj la tri tradukoj.

**España.**—Nuestro compañero el teniente coronel de Estado Mayor D. Román Ayza, ha publicado un folleto titulado «Teoría de los complementos y excedencias aritméticas», que ha sido muy bien recibido entre los matemáticos, por su originalidad y claridad en la exposición. Felicitamos á nuestro amigo, tan amante de las armas como de las ciencias y de nuestra querida lengua.

El grupo esperantista de *Murcia* recibió el 10 de Mayo una bella é interesante carta procedente del grupo de Praga, la cual ya ha visitado Berlín, Stockolmo, Petersburgo, Plovdin (Bulgaria), Roma y Alger, recibiendo expresiones de paz y amistad, con toda clase de curiosidades y propagando nuestro asunto, porque mientras los esperantistas lo contemplan con cariño, los otros con sorpresa admiran el Esperanto y son atraídos á él. El día 13 la carta salió para París, y posteriormente debe visitar Londres, Montreal, Méjico, Lima, Santiago de Chile, Melbourne, Manila, Bombay (India), Yokohama y volver á Praga. Ardientemente deseamos que termine su recorrido uniendo los corazones.

El grupo de *Murcia* se adhirió á las fiestas celebradas allí para conmemorar el tercer centenario de la publicación de la inmortal obra de nuestro glorioso Cervantes, y nuestros lectores recordarán que anunciamos un premio para la mejor traducción esperanta de cualquier capítulo del *Quijote*, de ese admirable libro que durante trescientos años hace reir á los pueblos y reflexionar á las personas ilustradas. Tres premios fueron adjudicados á tres buenas traducciones: una del Sr. Bourlet, sabio de importancia, habilísimo esperantista é incansable propagador de nuestra querida lengua en Francia, otra de nuestro nunca suficientemente alabado colaborador el capitán D. Vicente Inglada, y otra del fervoroso inglés Sr. Geo. C. Law. Todos, naturalmente, tradujeron de su lengua patria. Se nos asegura que el ensayo demuestra que sólo el Esperanto es fiel espejo para dar á conocer por completo una obra literaria, cuando no conocemos á fondo



La firmo Hachette eldonis belan brosuron titolitan la «Komerca Sekretario» verkitan de S-ro Johano Ros Sudriá, membro de Hispana Societo p. p. Esperanto; ĝi estas aro de diversaj modeloj por leteroj kaj dokumentoj komercaj, tre bone ordigitaj, kaj tial oni trovas facile kaj rapide kion oni bezonas. La stilo bela, simpla kaj preciza, certe plaĉos al la komercistoj, kiuj tiamaniere trovas grandan facilecon por la uzado de lingvo internacia faciligante la korespondadon kaj deflankigante la ĝenojn de malkompreniĝo.

la lengua en la cual está compuesta, y que pronto podremos verlo, cuando estén impresas las tres traducciones.

La casa Hachette ha editado un bonito folleto titulado el «Secretario comercial», compuesto por D. Juan Ros Sudriá, miembro de la Sociedad española para la propagación del Esperanto, la cual es una colección de diversos modelos para cartas y documentos comerciales muy bien ordenados, y por eso se encuentra con facilidad y rapidez lo que se necesita. El estilo bello, sencillo y apropiado, seguramente agraderá á los comerciantes, los cuales por este medio encontrarán gran facilidad para el uso de la lengua internacional facilitando la correspondencia y apartando las molestias de falta de comprensión.

## Trigonometria klarigo

*Nur unu el la anguloj de rektilinea triangulo povas esti rekta aŭ malakra.* (1)

Estu *a* la plej longa flanklinio de la proponita triangulo; dismetante konvene la elementojn de la subradiksignaj kvantoj en la konitaj formuloj

$$\operatorname{tg} \frac{1}{2} A = \sqrt{\frac{(p-b)(p-c)}{p(p-a)}}$$

$$\operatorname{tg} \frac{1}{2} B = \sqrt{\frac{(p-a)(p-c)}{p(p-b)}}$$

ni ricevos respektive

$$\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-b}{p-a} \text{ kaj } \frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-a}{p-b}$$

ambau produktoj havas la saman faktoron  $\frac{p-c}{p} < 1$  kaj tial ke  $\frac{p-b}{p-a} > 1$ , la fraccio  $\frac{p-a}{p-b}$  estas  $< 1$ .

## Aclaración trigonométrica

*Solamente uno de los ángulos de un triángulo rectilíneo puede ser recto u obtuso.*

Sea *a* el lado mayor del triángulo propuesto descomponiendo convenientemente las cantidades subradicales en las conocidas fórmulas

$$\operatorname{tg} \frac{1}{2} A = \sqrt{\frac{(p-b)(p-c)}{p(p-a)}}$$

$$\operatorname{tg} \frac{1}{2} B = \sqrt{\frac{(p-a)(p-c)}{p(p-b)}}$$

tendremos respectivamente

$$\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-b}{p-a} \text{ y } \frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-a}{p-b}$$

ambos productos tienen el mismo factor  $\frac{p-c}{p} < 1$  y como  $\frac{p-b}{p-a} > 1$ , la fracción  $\frac{p-a}{p-b}$  es  $< 1$ .

(1) Angulo akra=angulo  $< 90^\circ$ .  
Angulo malakra=angulo  $> 90^\circ$ .



La produkto  $\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-a}{p-b}$  estas do  
 ĉiam  $< 1$  kaj tial  $\frac{1}{2} B < 45^\circ$  aŭ  $B < 90^\circ$

La alia produkto  $\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-b}{p-a}$  povas  
 esti  $\geq 1$  kaj sekve  $\frac{1}{2} A \geq 45^\circ$  aŭ  $A \geq 90^\circ$

(De la «Trigonometrio» de ROMANO  
 AYZA, Stabestro de la 6.<sup>a</sup> divizio.)

El producto  $\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-a}{p-b}$  es, pues,  
 siempre  $< 1$  y por lo tanto  $\frac{1}{2} B < 45^\circ$  ó  
 $B < 90^\circ$ .

El otro producto  $\frac{p-c}{p} \cdot \frac{p-b}{p-a}$  puede  
 ser  $\geq 1$  y de consiguiente  $\frac{1}{2} A \geq 45^\circ$  ó  
 $A \geq 90^\circ$ .

(De la «Trigonometría» de D. ROMÁN  
 AYZA, Jeje de E. M. de la 6.<sup>a</sup> división.)

### La poeto kaj la ŝhaho

La sekvanta anekdoto estas rakontita de iu el la sekvantaro de la ŝhaho. Ĝi datas de l'avo de Muzafer-ed-Din.

Iam, al la reĝo plaĉis fari versojn, kjujn li donis por legi al la kortega poeto, ordonante al tiu ĉi, ke li sincere konigu ilian literaturan valoron. Malmulte kortegulema pro karaktero, tiu ĉi kuraĝis fari kelkajn kritikojn kiuj malplaĉis al la reĝo de l' reĝoj.

—Oni konduku tiun ĉi azenon en la stalon—ekkriis la Persa monarko—kaj oni lin alligu flanke de lia longorela frato!

La ordono estis tuj plenumita. La mizera poeto estis devigata vivi dum diversaj semajnoj flanke de majstro Aliboro.

La ŝhaho, juĝinte, ke la leciono estas sufiĉa, reliberigis la malliberulon. Li venigis lin denove antaŭ sin, kaj prezentis al li novan poezion, kiun li mem legis. La poeto aŭskultis la pecon sensanceliĝante, kaj poste, ne elparolante unu parolon, li rapide ekkuris.

—Kien vi iras?—demandis la ŝhaho.

—Reĝa Moŝto, mi reiras en la stalon!

La Reĝo bonkore ridis: la respondo estis senarmiginta lin!

Tradukis: L. COGEN.

### El poeto y el shah

La siguiente anécdota ha sido contada por uno del séquito del shah. Data del abuelo de Muzafer-ed-Din.

Una vez al rey se la antojó hacer unos versos que dió á leer al poeta de la corte, ordenándole que sinceramente diera á conocer su valor literario. Este, de carácter poco cortesano, se atrevió á hacer algunas críticas que desagradaron al rey de los reyes.

—Que se lleven á este asno al establo—exclamó el monarca persa—y que lo amarren al lado de su orejudo hermano!

La orden fué cumplida desde luego. El pobre poeta fué obligado á vivir varias semanas al lado del maestro Aliboro.

El shah, juzgando que la lección era suficiente, hizo poner en libertad al prisionero. Lo hizo venir de nuevo á su presencia y le mostró una nueva poesía que él mismo leyó. El poeta escuchó la composición con tranquilidad, y después sin hablar palabra echó á correr.

—¿A dónde vais?—le preguntó el shah.

—¡Señor, me vuelvo á la cuadra!

El rey se echó á reir de corazón: la respuesta le había desarmado.



# LA UNUA KISO

El E. de Neufville

Laŭ ordono de la Plejalta Kreinto, la tera paradizo eliĝis el ĥaoso, ornamita per floroj kaj verdaĵo: la akvo falis kaskade de la ŝtonegoj: la suproj de la arboj balanciĝis surversitaj de la vivigaj lumradioj de la tagastro. Ĉio elspiris gajon ĉirkauten: nur la unua homo velketis en sia izolado, demandante sin mem, kial la fiŝoj en akvo, la birdoj en aero, kaj la bestoj en arbaro, gee ludetis kaj karesis unu la alian.

Adamo ne komprenis ankoraŭ ĉi tiujn vortojn: «Kresku kaj multiĝu!»

Dio lin kompatis. Dum li dormadis, eltiris el li ripon kaj per ĝi formis ĉarman kreitaĵon, kiun li nomis Evo.

Adamo elvekiĝis kaj apude vidis konsolan anĝelon, kun longaj haroj ondantaj sur siaj nudaj ŝultroj: kun blankaj kaj kvazaŭ tornitaj brakoj, kunmetitaj sur sia movetanta brusto; kun belaj okuloj teren turnitaj; kun rozkoloraj vangoj, fleksebla eleganta talio, kaj delikataj piedetoj.

Rigardante Adamo tiom da perfektakoj, sentis kvazaŭ kovrotuko falas sur siajn okulojn La ĉielo brilegis tiam per sia tuta lumo. La floroj balanciĝis pli bonodoraj sur siaj trunketoj malfortaj. Murmuris la akvoj per melodio duoble plezuriga al orelo: ŝajnis, ke la tera elvidiĝo renoviĝas: ektemis la tuta naturo, kaj la mondoj ekhaltis en sia irado dum la ĉiela eĥo resonis la unuan homan kison.

El lingvo hispana tradukis, V. INGLADA.

## Sava elekto

Ŝercemulo multe ofendis sian imperiestron. Tiu ĉi ordonis ke oni alportu lin kaj per malbonhumora voĉo laŭtege reproĉis lin pro lia krimo kaj diris:

—Malfeliĉulo, mi punos vin kiel vi meritas. Vi preparu morti.

La kulpulo timege, falas ĝenue kaj demandas pardonon.

—Mi donas al vi ne pli ol unu favoro —diris la princo— ke vi elektu vian mortmanieron. Vi tuj decidu; mi volas esti obeota.

Tial ke via moŝto imperiestro donas al mi liberecon elekti—respondis la ŝerculo—mi demandas vin morti pro maljuneco.

Tiu ĉi respondo ridigis imperiestron kaj donis la pardonon.

Tradukis: J. VIDAL LLOPART.

## Elección salvadora

Un bufón había ofendido muy gravemente á un emperador. Este ordenó que compareciera en su presencia, y en tono de mal humor le echó en cara su crimen y le dijo:

—Desdichado, te castigaré como mereces; prepárate á morir.

El culpable, lleno de terror, cae de rodillas, y pide perdón.

—No te doy más gracia—dijo el príncipe—que la de escoger la clase de muerte. Decídete pronto, quiero ser obedecido.

—Ya que S. M. me da la libertad de escoger—respondió el bufón—pido morir de vejez.

Esta respuesta hizo reir al emperador, que le concedió el perdón.



## Hispanaj strofoj

Vi ne iru, kolegino,  
En la fonton serĉi akvon,  
Ĉar se vi falus okaze  
Malklarigus la fluado.

Kiam mi trovos la Morton  
Certe pro ĝi mi ne timos,  
Ĉar sen la Dia permeso  
Morto, mortigas nenium.

Pensu vin rigardas Dio  
Pensu ke Li ĉiom vidas.  
Pensu ke vi certe mortos  
Pensu vi nescias kiam.

Koron mi havas vunditan,  
Vundoj al mi tre doloras,  
Estas, ve! Tro malproksima  
Kiu sanigi ĝin povas.

Mi kiam mortos, tutkore  
Petegos al la Eterno  
Fenestreton inter nuboj,  
Por vidi vin de l' ĉielo.

En la strato de Mario  
Volas esti mi ŝtoneto  
Por ke ŝi sur mi mem paŝu  
Kaj mi kisu ŝiajn piedojn.

Brunan pentras Jesu' Kriston  
Brunan pentras ja Magdalon  
Kaj mi amas brunulinon!  
Vivu ĉiam brunularon!

Vin ĝojigu, bela korpo  
Ĉar mirinde vin beligas  
La varmeg' de la somero  
Kaj ankaŭ la frostoj vintraj.

Se sciis mik e por vi  
Mi kombas miajn kapharojn  
Mi certe ilin elŝirus  
Kaj ilin ĵetus en fajron.

Leteron mi al vi skribis  
Per sango de mia koro,  
Vi gardu ĝin, vivo mia  
Por la tag de mia morto.

Antaŭlonge estas dolĉaj  
De la mond' la akvoj maraj;  
Mia brunulino kraĉis,  
Ili fariĝis tuj salaj!

## Coplas españolas

No vayas, compañerita,  
A buscar agua á la fuente,  
Que si resbalas y caes  
Se enturbiará la corriente.

La muerte no me da miedo,  
Aunque la encuentre en la calle,  
Que sin licencia de Dios  
La muerte no mata á nadie.

Piensa que te mira Dios,  
Piensa que te está mirando,  
Piensa que te has de morir,  
Piensa que no sabes cuándo.

El corazón tengo herido  
Y las heridas me duelen,  
Pero está lejos de aquí  
El que sanármelas puede.

Si me muero, cuando muera  
He de pedir al Eterno:  
Una ventana en las nubes  
Para verte desde el cielo.

Piedrecita de tu calle,  
María, quisiera ser;  
Para que tú me pisaras  
Y yo besarte los pies.

Moreno pintan á Cristo,  
Morena á la Magdalena,  
Moreno es el bien que adoro.  
¡Viva la gente morena!

Alégrate, cuerpo bueno,  
Que te vas hermoseando  
Con el frío del invierno  
Y la calor del verano.

Si supiera ó entendiera  
Que para tí me peinaba,  
Me arrancara los cabellos  
Y á la lumbre los echara.

Una carta te escribí  
Con la sangre de mis venas,  
Consérvala, vida mía,  
Para cuando yo me muera.

Antiguamente eran dulces  
Todas las aguas del mar,  
Pero escupió mi morena,  
¡Y se volvieron salás!



Mi elŝiris du foliojn  
 El la paradiza arbo  
 Liberecon, diras unu  
 Kaj l'alia diras amon!

La oranĝo kreskis verda  
 Kaj la temp' ĝin maturigis,  
 Estis mia kor' libera  
 Kaj vi ĝin malliberigis.

Ne rigardu mian haŭton  
 Ĉar mi estas tre bruneta;  
 Sed rigardu mian zonon  
 Kaj vi vidos ion belan.

De via flora fenestro  
 Vi jetis al mi citronon,  
 Ĝi frapis min sur la frunto,  
 Acido ĝia sur koro.

Patrino! al mi rompiĝis  
 La kruĉo apud la fonto  
 Mi ne bedaŭras la kruĉon  
 Sed kion diros la popolo!

R. CODORNIU.

Del árbol del Paraíso  
 Llevo arrancadas dos hojas:  
 ¡Libertad!, dice la una;  
 ¡Cariño!, dice la otra.

La naranja nació verde,  
 Y el tiempo la maduró;  
 Mi corazón nació libre  
 Y el tuyo lo aprisionó.

No me mire usted la cara,  
 Que soy un mucho morena;  
 Míreme usted á la cintura  
 Y verá una cosa buena.

Ayer, desde tu ventana,  
 Me tirastes un limón,  
 El limón me dió en la frente  
 Y el agrio en el corazón.

¡Ay, madre, que se me ha roto  
 El cantarito en la fuente.  
 No siento yo el cantarito,  
 Si no qué dirá la gente.

## PROBLEMO

A	D
B	C

La banderolo A B C D havas du flankojn, la fruntan kaj la dorsan, kiuj estas enigataj per kvar linioj rektaj. Faru el ĝi supraĵon kiu nur enhavu unu flankon enigata per unu linio.

## Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

### SINJORINOJ:

A. C. Paris—Passy (Francujo).

### FRAŬLINOJ:

T. B. Valencia (Hispanujo).

### SINJOROJ:

L. G. Roma (Italujo).—L. R. Murcia (Hispanujo).—T. A. R. Cottabato, Mindanao (Filipinas).—Rev. P. G. C. Sevilla (Hispanujo).—B. S. Harnosand (Suedujo).—E. C. Tarancón (Hispanujo).—Rev. P. J. M. Tarrasa (Hispanujo).—D-ro Voronej Rusujo.—J. M. Escorial (Hispanujo).—Rev. P. M. P. Toloso (Hispanujo).—M. A. W. Varsovio (Rusujo).—J. L. Majunga (Madagascar).—S. C. Manresa (Hispanujo).—A. B. B. Varsovio (Rusujo).—C. L. de H. Barcelono (Hispanujo).—J. B. M. San Fernando (Hispanujo).

Mi ricevis viajn abonpagojn dum 1905. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. J. L.



## NIAJ VIZITANTOJ

N.º 12, 1904, kaj 13, 1905.—**Internacia Scienca Revuo.** 27, boulevard Arago Parizo, (Francujo). Jarabono; 7 fr.

N. 11, Novembro 1904.—**La Holanda Pioniro.** Hilversum, Holando. Jarabono, 3 fr.

N.º 17 1905.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près Tours (Indre et Loire Francujo). Jarabono, 2,50 fr.

N.º 19, 1905.—**The Esperantist.** 67, Kenington Gardens Square, W., London. Jarabono, 4 fr.

N.º 5, 1905.—**The British Esperantist.** 1, street, Strand, Londono. Jarabono, 2 frankoj.

N.º 9, 1905.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, Lima (Peruo). Jarabono, 3 fr.

N.º 2 kaj 3, III jaro, 1905.—**Juna Esperantisto.** 9, avenue des Vollandes, Genève (Svisujo). Jarabono, 2 fr.

N.º 118 kaj 119, 1905.—**Museo Exposición.** Medina, 37, Alicante. Jarabono, 5 pesetoj.

Jan.-Feb. 1905.—**La Meksika Lumturo.** Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz (Meksikujo). Jarabono, 3 fr.

N.º 3, 1905.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, Genève (Svisujo). Jarabono, 2,50 fr.

N.º 5 2.<sup>a</sup> jaro, 1905.—**Germana Esperantisto.** Prinzentrasse, 95, Berlin S. (Germanujo). Jarabono 3 markoj.

N.º 1129, la 12<sup>a</sup> Februaro 1905.—**Les Annales politiques & litteraires.** 4 rue Scribe, Paris (Francujo). Jarabono, 10 fr.

N.º 5 kaj 6.—**La Algèra Stelo.** 57, rue d'Isly, Algèr (Algèrujo). Jarabono, 3 fr.

N.º 99 kaj 100.—**Revista del Ateneo Obrero Manresano.** Borne, 13, Manresa. Senpage al la protektantoj. Unu numero, 0,10 pesetoj.

N.º 79, 82 kaj 84.—**La Revue de l'Esperanto en Le Cicerone.** 102, rue de la Paix, Boulogne sur-mer (Francujo). Jarabono, 10 fr.

N.º 10.908.—**La France du Nord.** 37, rue Thiers, Boulogne-s-m (Francujo). Jarabono, 28 fr.

N.º 3.—**Espero de Katalunjo.** Presejo Lamiot, Ceret (Francujo). 0,05 numero.

N. 115 kaj 118.—**Lingvo Internacia.** 33, rue Lacedède. Paris. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.

N.º 1.—**Ruslanda Esperantisto.** S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24. Rusujo. unu numero 30 kopekojn.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

La Prezidanto de la Grupo esperantista pariza informas nin, ke la membroj de la nomita grupo kunvenas ĉiumerkrede, je la naŭa vespere, en «Café de la Rotonde», 36 bis, boulevard Haussmann, kaj ĉiu vendrede je la deka vespere, en «Café Soufflet», 25, boulevard St Michel, en rezervitaj salonoj.

Nur Esperanto estas uzata en tiuj kunvenoj, kaj la fremdaj geesperantistoj ĉiam estas akceptataj kiel eble plej afable.

Sinjoro A. C. Body, 34, Greenbank-Avenue, Plymouth (Anglujo) deziras korespondadi kun fremdaj geesperantistoj. Ĉiam tuj respondos.



La lernejo de Skolapioj de Tolosa organizas esperantistan ekspozicion kaj petegas la sendon kiun ĝi tre dankos de poŝtkartoj kaj kiu ajn esperantistaj dokumentoj. Adresu: *Rev. P. Rector de las Escuelas Pias de Tolosa—Guipúzcoa—(España)*.

Sinjoro *Roman Amvrosieviĉ, Ĵemseisk Frenkel, Rusujo, Siberujo* deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn meksikajn, portugaliajn kaj hispanajn por samaj nombroj da rusaj uzitaj poŝtmarkoj.

*Weber Josefo Brunn, Waisenhausgasse 21, Aŭstrujo, Moravujo* deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

ESPERANTA LIGILO.—Ĉiudumonata Revuo.—*Th. Cart, Ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, Paris.*—Abonkosto: jare 3 fr. Dua jaro (1905). N.º 3.—Enhavo: 1. Avizo kaj notetoj, (Th. Cart).—2. Norda Printempo (H. Harlsten).—3. Revaĵo (Grabovski).—4. Kongreso en Boulogne.—5. Kroniko (Thilander).—6. Problemoj.—7. Miksaĵoj. Felietono: Janko Muzikanto (daŭrigo). Srul el Lubartov.

Ĝis nun, la esperantista gazetaro, jam riĉa je bonegaj, periodaj presajoj, naciaj por la propagando, aŭ internaciaj «por la helpa lingvo» ne havas ĝeneralan organon por la *Esperantistoj* tio estas revuon tian, kia tiuj liverataj nune, en la diversaj landoj, al la homa sciemo; kaj presata per la lingvo de nia lando: *Esperantistujo*.

Tiun malplenan fakon, TRA LA MONDO, esperantista revuo, *tutmonda kaj ilustrita*, provos p enigi.

Penante interesi ĉiujn kategoriojn da legantoj, seriozaj kaj vanaj; viroj, virinoj, gejunuloj kaj infanoj, ĝi serĉos esti ligilo inter ĉiuj membroj de la granda kaj bela familio esperantista, kiu al si proponas montri sian kunligon, grupiĝante baldaŭ en Boulogne-sur mer, ĉirkaŭ sia honorata estro.

Ĝenerala plano: Ĉiu numero de TRA LA MONDO enhavos sekvantajn fakojn. I. Nuntempaĵoj: Tutmonda kroniko kaj ĉieaj enoj.—II. Tra Esperantistujo.—III. Diversaĵoj.—IV. Artista aŭ literatura vivado.—V. Diversaj sciencoj, aŭ Komerco kaj Industrio.—VI. Teatra fako.—VII. Militistaro kaj maristaro, aŭ Sportoj.—VIII. Virina, aŭ gejunula paĝo.—IX. Felietono.—X. Miksa paĝo: Por la propagando, ludoj, miksaĵoj.

*Multaj ilustraĵoj* akompanos kaj pli interesigos la tekstojn, kiuj, dank'al la taŭgeco de Esperanto por internacia informado povos esti pli variaj ol en kiu, ajn nacia revuo.

*Oftaj konkursoj* kun premioj estos malfermataj inter abonintoj kaj legantoj de la revuo. *Seriozaj profitoj* estos donataj, al kiuj varbos geabonantojn. *Malgraŭ tiuj agrablaĵoj*, la revuo kostos nur 7 fr. en Francujo kaj 7'50 en aliaj landoj. Oni mendu specimenon, kiu, escepte, kostos nur 0'60c aliloke (aldoni poŝtmarkojn por pago). Sin turni al Administracio de «Tra la Mondo», 15 boulevard des 2 gares, Meudon (S et O), France.

La personeco de la ĉefa redaktoro, S-ro Aŭgusto Montrosier, tiel konata de sia aktiveco kaj sia lerta traduko de «Unua ĉapitro de miaj memorskriboj» estas certa garantiado por la legontoj kaj pri la indeco de la revuo.



**Stereoskopaj Vidajoj** de *Teruelo* kaj *Albarracín'o*, 9×18 c/m—Aron da 12, 6 pesetoj; 6 arojn, 33; 12 arojn, 60, en Hispanujo. Por fremdlandoj, la pago estas per frankoj. Sin turnu ĉe *S-ro Emilio Marconell, cura párroco, Gea Teruel—(España)*

**HISPANA JARLIBRO ESPERANTISTA** enhavanta la regularon de Hispana Societo por propagando Esperanto, la protokolojn de la kunsidoj okazintaj dum la jaro 1904, la nomaron de ĉiuj hispanaj esperantistoj kaj iliajn nunajn adresojn—0,25 pesetoj kun poŝtkosto kaj 0,55 se oni dezirus ĝin ricevi pt—rekomenditan. Faru la mendojn ĉe la Administrejo de LA SUNO HISPANA aŭ al S-ro Manuel Benavente, Sociedad, 14, Murcia (Hispanujo). La membroj de H. S. p. p. E. ricevos ĝin senpage kontraŭ la sendo de ilia kotizaĵo por 1905.

**Sociedad Española para la propagación del Esperanto.**—*Presidente*, D. Ricardo Codorniu, Ingeniero Jefe de Montes. Paseo del Malecón, C, Murcia.—*Secretario*: Reverendo P. Antonio Guinart, Escuelas Pías, Valencia.—Cuota anual: 1 peseta.—Informes al Secretario.

**EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA**—*Sociedad, 14*—Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad y de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

**Diccionario esperanto español de raíces, una peseta**; Gramática, 0,75; cuadro de palabras correlativas, 0,05; enumeración y significado de los afijos, 0,20; ejercicio de traducción, 0,50.—Rvdo. P. ANTONIO GUINART—ESCUELAS PÍAS—VALENCIA.

*L' Esperantiste* oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro, 4 fr. kun enskribo en la societon. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France.*

**LONDONO** Pensio per gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaĵoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvo. *Sinjorino O'Connor, Esperanto House, St-Stephen's Sq. Bayswater, 10.*

**ESPERANTO** Manual y ejercicios, 3 pesetas.—Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, 6 pesetas. Por INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA.—En las principales librerías de España y América y en la Secretaría de H. S. p. p. E.—Escuelas Pías—Valencia.

Ni translokis la Administracion de nia gazeto kaj ni petas, oni adresu la korespondadojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn, al sinjoro Augusto Jimenez Loira, Direktoro-Administranto de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).

Hemos trasladado la Administracion de nuestro periódico y rogamos que se dirija la correspondencia, abonos y todos los asuntos, al señor Augusto Jimenez Loira, Director-Administrador de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).